



# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ elokuu ♦ aŭgusto ♦ 4/2008



*Gesperantistoj ĉe "Marista bovino" –  
farbita bele blublanka, kio bedaŭrinde ne  
videblas en nia nigrablanka gazeto – sur  
ondorompilo en Ventspils dum BET 44.  
(Artikolo sur p. 7)*

## **Sukcesa kurso en Valamo, p. 5, 20**

**Aŭtunaj Tagoj, p. 14 ♦ Raporto el Roterdamo, s. 8  
Turneo de Fransŭaz Rochette en Finnlando, p. 17**

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo:** ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 050 365 0037 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

**Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 20 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

**Pankkitili/Bankkonto:** Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

**Sekretario/Sihtööri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**

*Börje Eriksson*, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

*Taneli Huuskonen*, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

*Jukka Laaksonen*, Orimuskatu 79 B 4, 33580 Tampere. ☎ (03) 2554 724 ✉ jvaletto@kolumbus.fi

*Paula Niinikorpi*, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**

*Teuvo Alavillamo*, Leväsjoentie 535 C, 29810 Siikainen. ☎ 040 536 9728 ✉ fantomo@jippii.fi

*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@kotikone.fi

*Vilorg Teräväinen*, Kaunisharjunpolku 3 E 61, 15800 Lahti. ☎ (03) 734 3978 ✉ vilorg@elmi.fi

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** Sampo 800017-230825.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Officejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Internet:** <http://www.esperanto.fi>





## Du eventoj inter nacioj

Ĉirkaŭ la tempo de la apero de ĉi tiu numero de Esperantolehti okazis du aferoj, ambaŭ tre internaciaj kaj tre naciaj. Estas la Olimpikaj ludoj en Pekino kaj la milito en Kaŭkazo.

Olimpikaj ludoj kunvenigas dekmil sportistojn el ducentkvar landoj de la globo. Centmiloj da spektantoj en la okazejoj, miliardoj (?) ĉe televidiloj. Milionoj da homoj laborintaj kaj laborantaj por la evento. Grandaj ŝanĝoj en la ĉina ĉefurbo; modernigo, pompo.

En la Olimpikoj oni konkuras pri tio, kiuj faras plej bonajn rezultojn en sportaj ludoj. Homoj laŭnature emas fari kaj esti bona faranto. Sporto estas pura farado, kaj precize mezurebla. Tial ĝi estas la plej populara. — En la genia prisporta satiro de Juhani Peltonen (1941–1998), “Elmo”, troviĝas konstato ke nenio, kiel poezio, politiko, esperanto ktp. ne povas kiel pasio esti komparebla kun sporto... —

Laŭ la origina ideo de la modernaj Olimpikoj sportanta junularo konkuras sendepende (verŝajne tiel estis la ideo). Ampleksa evento tamen bezonas esti organizita. Organiziĝo bezonas kolektivon, kaj tiu ekde la komenco de la Olimpika movado estas regionoj kaj ŝtatoj – nacioj. La sporta movado ne estas aparta de cetera socia evoluo, kaj la moderna Olimpika movado kreskis samtempe kaj

egalpaŝe kun naciaj aspiroj kaj apero de naciaj ŝtatoj. Ankaŭ ni finnoj – el kiuj antaŭ cent jaroj certe ne ĉiuj ankoraŭ konsciis sin finnoj – partoprenis la Olimpikajn ludojn ekde 1908. Sportuloj estis io kaj iuj por senti komunecon.


Olimpikoj do estis kaj estas io nacia, en la organiziĝo laŭ identeco regiona-kultura-lingva, kaj io internacia, identeco en rilato kun aliaj nacioj.

Nacio estas parto de la homa organiziĝo, sed nacionalismo estas miskompreni tion. En Olimpikoj foje povas manifestiĝi nacionalismo. Ŝtatoj ne evitas provi limojn de metodoj, ankaŭ malhonestaj kaj malhomecaj, por nacie venki. Nacia organiziĝo kaj gajnemo superas la memkompreneblan postulon de internacia harmonio, kaj ankaŭ naci-nivele la memkompreneblan postulon de respekto al la homo.

Milito estas fenomeno tre kontraŭa al sporta festo. Sed la du facetoj de organiziĝo, nacia kaj internacia, troviĝas ankaŭ ĉi tie. — Finnlando kiel ŝtato havas en la nuna bedaŭrinda situacio apartan rolon kiel aktuala prezidanto de Organizaĵo por Eŭropa sekureco kaj kunlaboro. Havu nia lando sian tradician rolon – ne de juĝisto, sed de kuracisto.

*Tuomo Grundström*

## Kesä ilman esperantoa



Vietin pitkästä ajasta kesän osallistumatta mihinkään esperantotapahtumaan – edellisen keran sama pääsi tapahtumaan tasan kymmenen vuotta sitten. Vuosikymmenen mittaan minulle oli tullut jo tavaksi pyöräillä monta viikkoa ulkomailla ja suunnitella reitti kulkemaan BETin tai muun sopivassa paikassa tapahtuvan kongressin kautta.

Tänä vuonna sain vähän vaihtelua pysyttelemällä kotimaassa, mutta kuitenkin melko kansainvälisessä seurassa, sillä kaksi viikkoa kului viisitoistahenkisessä ryhmässä, johon kuului kolmen eri maan asukkaita, jotka puhuivat äidinkielenä neljää eri kieltä. Yhteisenä kielenä oli pääasiassa englanti, mutta mukana oli kuitenkin myös joitakin, jotka osasivat englantia vain vähän tai ei ollenkaan. Toisaalta suurin osa puhui äidinkielenään suomea tai venäjää, ja jokainen osasi ainakin jotenkin jompaakumpaa ja muutama molempia, joten keskusteluja käytiin myös suomen ja venäjän välillä tulkkaamalla.

Kielikysymystä tuli siis moneenkin kertaan mietittyä, ja minulle ainakin oli selvää, että esperantolle olisi tässäkin joukossa ollut käyttöä. Huonosti puhuttu englanti kyllä toimii kansainvälisen ryhmän käyttökielenä, mutta jos samalla opiskelumäärällä saataisiin käyttöön hyvin puhuttu esperanto, niin kyllä se sujuvampaa olisi. En ottanut esperantoa erityisesti missään vaiheessa puheenaiheeksi, mutta kaksiviikkosen lopussa luultavasti kaikki muut olivat jo tietoisia siitä, että harrastan esperantoa. Jotkut osoittivat jonkinlaista kiinnostustakin siihen,

mutta ehdittiin törmätä myös yleiseen ennakkoluuloon, että esperanto on ”hyvä idea, mutta käytännössä osoittautunut, että se ei toimi”.

Oikeastihan esperanto kyllä toimii aivan hyvin, mutta vaikeahan sitä on todistaa muille, jos paikalla ei ole muita esperanton osaajia. Mikä sitten saisi laajemmat ihmisjoukot opiskelemaan esperantoa? Jos esperanton osaajia osuisi vähänkin useammin monta yhdessä sellaiseen kansainväliseen tapaamiseen, joka ei aiheeltaan ole erityisesti esperantotapahtuma, niin voisi ajatella, että se alkaisi nopeastikin saavuttaa yleisen kiinnostuksen ja aseman yleisenä käyttökielenä. Esperanton paradoksi on, että sitä ovat opiskelleet lähinnä sellaiset ihmiset, jotka muutenkin ovat kiinnostuneita kielistä ja opiskelleet monia muitakin kieliä. Tämän suppean joukon ulkopuolella olisi paljon ihmisiä, joille vieraan kielen opiskelu on oikeasti vaikeaa. Juuri heille suuri hyöty olisi esperantosta, mutta he yleensä suuntaavatkin kielenoppimiskykynsä siihen, että osaisivat edes vähän englantia, koska se on se kielitaito, josta nykytilanteessa ja välittömässä tulevaisuudessa on odotettavissa eniten hyötyä.

Toki sain alkukesällä vähän myös puhua esperantoa, kun Pasporta Servoa käyttävä matkaja tuli muutamaksi päiväksi käymään. Ensi kesäksi suunnitelmat ovatkin sitten taas auki, mutta esperanton maailmankongressi olisi kylä paikassa, joka on ihan mukavasti polkupyörällä tavoitettavissa.

*Mikko Mäkitalo*

## Esperantokurso en Valamo – ĉi-jare tri kursoniveleoj

La ĉi-jara esperantokurso en Popola Instituto de Valamo okazis en amuza atmosfero kun entute 23 gelernantoj. De ili tri venis eksterlande, el Estonio, Svedio kaj Rusio. Ĉi-jara kurso estis la 9a sinsekva. La kurso atingis ankaŭ intereson de la gazetaro: dufoje okazis radiointervjuoj kaj ĵaŭde loka ĵurnalistino sekvis la kurson dum preskaŭ unu horon. Artikolo aperis en Heinäveden lehti komence de julio.

Instruistoj estis ĉi-jare tri: krom Atilio kaj mi estis lastminute alvokita Patrik Austin, kiu bon-

ege plenigis la taskon. Ni ĉiuj instruis kaj gvidis la tri kursoniveleojn: elementanoj, daŭrigantoj kaj konversaciantoj. En ĉiu grupo estis po 7-8 gelernantoj. Surbaze de komentoj, kiujn donis la kursanoj, plaĉis al ili la multflanka instruado kaj la diversaj konversacioj kaj tute ne ĝenis la ĉiuleciana ŝanĝo de la instruisto.

La libertempa programo enhavis rondiradon en la monaĥeja areo kaj vizitojn al kruco de migranto kaj al la monaĥeja tombejo. La rondiradon kaj la tombejan viziton gvidis Jukka Laaksonen ▷



*Jen la tuta kurso 2008 – 23 gelernantoj kaj 3 instruistoj – en la halo de la Instituto de Valamo. De maldekstre starante: Kerstin, Maisa, Lydia, Mathias, Matti W., Kerttu, Ritva, Anita, Riitta, Aino Leena, Matti E., Eeva, Marjatta, Maria, Katja, Kimmo, Liisa, Osmo, Jukka, Inkeri, Sirkka, Raimo. Sidas Atilio, Patrik, Alia kaj Tiina.*

ankaŭ esperante. Dum la migrado al kruco la kursanoj kafumis en la bela naturo. Kompreneble dum la kursosemajno eblis ankaŭ saŭnumado.

La vesperaj kunestadoj enhavis ĉi-jare speciale multe da muziko, ni ja havis inter ni membron de Dolchamar-bando. Inter la kursanoj estis bonaj kantistoj kaj lerta akordionisto. Unu vesperon ni memoris nian nacian poeton J.L. Runeberg legante kelkajn de liaj famaj poemoj kaj fine kantante la nacian himnon de Finnlando, kompreneble esperante.

La lastan vesperon kun festaj manĝoj en Valamo stilo partoprenis ankaŭ deko da vizitantoj kaj el Finnlando kaj eĉ el Pollando du: Terese Nemere kun nepino. La poemo Nokturno sonis belege kiam la kursanoj kantis ĝin kune kun mi, kiu ludis la melodion per violono.

Vendredmatene ni havis la plezuron aŭskulti gastan preleganton, kiam Terese rakontis al ni pri Torunaj spickukoj. Multaj de komencantaj gelernantoj ĝuis, kiam ili rimarkis kiel bone ili komprenis la vortojn de Terese eĉ sen traduko, kiu sekvis finne.

Fine de la kurso venis la rektoro de la Popola Instituto, Sirpa Koriala, kiu dankis pri la kursoaranĝoj kaj bonvenigis nin denove al Valamo. Por ni estas rezervita la sama semajno tuj post la johano-festo (22.-26.6.2009). Kiel ekskurso estas planita vizito al la malnova Valamo de Ladoga tuj post la kursosemajno. Pliaj informoj sekvas en Esperantolehti/Esperanta Finnlando kaj en niaj retpaĝoj.

*Tiina Oittinen*

---

## Al esperanto en Valamo

Dum la lasta semajno en junio 2008 mi partoprenis kurson de esperanto en Valamo, estis la dua fojo por mi tie. Ankaŭ kelkaj aliaj kursanoj partoprenis denove kaj mi ĝojis revidi ilin. Oni povas atingi Valamon diversmaniere. Mi veturis per trajno plus taksio. Aliaj manieroj estas iri per ekspresbuso aŭ per aŭto.

La grekortodoksa monaĥejo Valamo kun sia Popola Instituto troviĝas en sudorienta Finnlando. Valamo situas bele en la arbaro ĉe la lago Juojärvi, kiu estas tre pura. Tranoktejo kaj restoracio estas bonaj. Mi multe ŝatas la trankvilan kaj samtempe kulturalan etoson de la monaĥeja grundo.

Instruis kiel la pasintan someron Atilio el Nederlando kaj Tiina el Turku. Ankaŭ instruis Patrik el Helsinki ĉar ni estis 22 kursanoj dividitaj en tri grupoj laŭ scio de la lingvo. La instruistoj ŝanĝis inter la grupoj kaj ĉiu havis sian individuan manieron instrui. En mia grupo ni multe diskutis pri diversaj temoj, ludis rolojn kaj plibonigis vortprovizon. Mia grupo estis vere

internacia. La partoprenantoj venis de Finnlando, Svedio (mi), Estonio kaj Rusio. La instruado daŭris dum kvin horoj tage. Mi volas danki Atilio, Tiina kaj Patrik pro bona instruado kaj krom tio pro agrablaj programoj dum la libera tempo. Tiina ludis violonon kaj Patrik ludis gitaron. Ni kune kantis en esperanto, i.a. la nacian himnon. Tradicie ni vizitis la monaĥejan tombejon. Estis bela vespero kiam ni ĝuis finnan saŭnon ĉe la bordo de Juojärvi.

Mi sentas min kontenta havi eblecon paroli esperanton dum tuta semajno sub lerta gvidado. Hejme mi loĝas en malgranda urbo kie mi estas la sola esperantisto. La lingvon mi praktikas per legado kaj korespondado.

Venontsomere la esperanta kurso en Valamo festos dekjaran jubileon. Mi rekomendas, venu mem kaj spertu la kurson, jubileon kaj etoson de Valamo.

*Kerstin Kristoferson*

▷ *Rakonto de Katja el Rusio sur paĝo 20.*

## Baltiaj Esperanto-Tagoj en Latvio

BET 44 okazis 5.-12.7.2008 en marborda urbo Ventspils (loĝantaro 44 mil). Aliĝis 150 homoj el 15 landoj, inter ili 8 finnoj, sed ne ĉiuj alvenis. Plejparto loĝis en sufiĉe komfortaj studentaj ĉambroj de Altlernejo aŭ Metilernejo. Manĝado kaj vojaĝado en Latvio kostas malpli ol en Finnlando.

La urbon oni rekomendas al ĉiuaj homoj. Floroj, fontanoj kaj amuzaj statuoj plibeligas ĝin. Oni povas bani sin en maro, plaĝoj longas kilometrojn, la sablo estas pura kaj fajna, inter la dunoj oni trovas ŝirmejojn de la vento kaj fremduloj. Sportejoj kaj ludejoj troveblas en parkoj. En la urba biblioteko BETanoj rajtis senpage uzi interreton.



La BETejoj estis lernejoj, kies ĉambroj oni uzis por diversnivela lingvokurso, prelegoj kaj ludoj. Du koncertoj okazis en la urba Kulturdomo. Unu tutan tagon oni uzis por aŭtobusaj ekskursoj.

Piediraj promenadoj estis organizitaj al proksimaj interesejoj. Ĉiutage aperis informilo VentaVento – Venta estas la loka rivero. Sur la unu-

folia informilo aperis fotoj pri okazintaĵoj, prezentoj de aktivuloj kaj loka E-movado, horaro por la tago. Inter la programeroj troviĝis prelegoj pri livoj kaj liva lingvo, finna verkisto Waltari (fare de T. Grundström), kosmologio de Martinus, trafika politiko en Berlino, japanaj skribosistemoj, origamio, hodiaŭa Estonio, graveco de la finaj vokaloj en E-to, teatraĵa monologo el la libro Danĝera edukado de H. Brown (prezentis ĝin lia vidvino K. Rohdin). En la libroservo oni povis vidi verkojn de tri latvaj geartistoj: Alice Medina (n.1984) – pentraĵoj, desegnaĵoj, poŝtkartoj; Janis Strupulis (n. 1949) – medaloj, moneroj; Aija Turka – desegnaĵoj. Okazis katolika diservo kaj urbestra akcepto.

En la Internacia koncerto deklamis, ludis kaj kantis la BETanoj mem. La adiaŭan vesperon oni pasigis en ĉemara subĉiela parko, kie troviĝas konstruaĵoj kaj boatoj el fiŝkaptistaj regionoj, precipe de la 19a jarcento, sed ankaŭ balanciloj, statuoj kaj ankroj, ne paroli pri la trinkejo kaj dancejo.

*Saliko*



*Inter la programo de BET estis prelegoj de la sinjoroj Banaitis (pri esperantaj vokaloj), Hirsik (pri hodiaŭa Estonio) kaj Jamada (pri japanaj skribosistemoj).*



# Pri la 93a UK en Roterdamo

## – karavano kaj kongresaj eventoj

### Karavana busvojaĝo

La kvara karavano en serio BB/BR veturis al Roterdamo tra Svedio kaj Danio. Ekveturo okazis la 17an de julio vespere el Turku, kien la 25 karavananoj venis el tuta Finnlando de sudo al nordo (Espoo – Taivalkoski) kaj de okcidento al oriento (Vaasa – Iisalmi). Eĉ kunvojaĝis du eksterlandanoj el Belorusio kaj el Murmansk, Rusio. Krome unu persono el Turku flugis al Nederlando kaj loĝis en la sama hotelo kun ni aliaj. Nia aŭtobuso kun la ŝoforo Timo Launokorpi estis el insulo Kemiö de Sud-Finnlando.

En Svedio ni haltis ĉe la bela urbeto Gränna kaj konatiĝis kun la famaj bombonoj kaj kun historio de ankaŭ al ni konataj svedoj. Reenveturante ni preterpasis Gränna, sed sekvis longe la bordon de la grandega lago Vättern. Nia horaro ne permesis al ni multe da veturado en etaj vojoj, sed tamen eblis travojaĝo en la urbo Vadstena, kiu estas ĝemelurbo de Naantali (en ambaŭ estis siatempe fondita monaĥinejo omaĝe de Sankta Birgitta).

Nia unua tranokto okazis en Puttgarden, Germanio. La hotelo Danio situis tuj apud la haveno

kaj ni estis afable akceptitaj tie. Surflanke de Danlando ni jam esperis esti frue ĉe nia celo. Sed pro iu nekomprenebla kialo ni ne rajtis veturi en la ŝipon kaj tiel maltrafis du pramojn kaj perdis unu horon de ĉeestado en Germanio. Nun, tiaj ja povas esti la busvojaĝoj.

Sabatmatene ni ekveturis je la oka kaj sekvis la vojon preter Osnabrück pensante ke ni estus en Roterdamo ja je la kvara. Sed tio ne sukcesis, ĉar pro multo da trafiko kaj dumvojjaj riparlaboroj ni devis veturi pli malrapide ol planita. Al Roterdamo ni tamen alvenis bonorde je 17a, trovis unue la kongresejon kaj poste bonege la hotelon Eden Savoy. Dank’ al nia trankvila kaj afabla ŝoforo ĉio iris glate.

Por la reenveturo ni elektis la vojon tra Groningen al Germanio. Pro spertoj pri la trafiko ni decidis ekiri jam matene sabate 26an de julio kaj tiel lasi partoprenadon en la solenan fermon ĉi-foje. Tio evententiĝis esti bona ideo, ĉar nia alveno al la hotelo en urbeto apud Kopenhago je la 23a ne estis senproblema – tamen post ioma trarigardo de niaj rezervaj dokumentoj la hotela oficisto trovis ĉambrojn al ĉiuj kaj ni povis ripoz

zi post la longa tago en la aŭtobuso. Kaj sekvan tagon la veturado tra Svedio estis afabla, ni estis bontempe en Stokholmo, kie ni atingis la ŝipon al Turku senprobleme.

Koran dankon pro ĉiuj kunvojaĝantoj! Apartan dankon al nia ŝoforo Timo, kiu trovis solvon al ĉiuj problemetoj (ekzemple al la subite malfunkcia seĝo de la ŝoforo), kiuj okazis dumvoje.

*Enirejo de la kongresejo.*

*(Foto: Pedro Hernández)*





**La kongresa kuriero Jubileanto 4 raportis jene la 24-an de julio:**

**Malnov-holandaj ludoj:**

*“La gajninto de lundo kaj mardo (kune) estas: Lych Jaroslav KN 1809, kiu kolektis entute 763 poentojn. Ni gratulas! Sed kiu gajnos la pokalon en vendredo?”*

*Ankaŭ la pokalon gajnis Jaroslav, jen li kun la premio en la karavana buso dum hejmveturo.*

## **Kongresaj eventoj el vidpunkto de EAF-funkciuloj**

Esperanto-Asocio de Finnlando havis budon en la Movada Foiro, kiu okazis en la ĉefa halo de la kongresejo dum la unua interkona vespero. Ni havis bonan eblecon reklami pri Esperanto-aranĝoj en Finnlando kaj konatiĝi kun aliaj organizaĵoj en la vasta Esperantolando. En la foiro sin prezentis ĉirkaŭ 80 asocioj. EAF dividis tablon kun Sveda Esperanto-Federacio kaj tie deĵoris la estraranoj Päivi, Jukka, Markku kaj Tiina.

Jukka Pietiläinen salutis la kongreson por EAF dirante ke la 101-jara EAF gratulas sian unu jaron pli junan fraton, UEA. Sed unue li diris “bonan tagon” en la finna same kiel la aliaj 73 landaj salutantoj, kiuj ĉiuj estis petitaj saluti en sia propra lingvo.

La Komitato de UEA kunsidis sabate kaj vendrede dum la kongresa semajno. Jukka P. partoprenis la kunsidojn kiel B-komitatano. Tiina reprezentis EAF:n en la komitato kiel anstataŭanto de A-komitatano, sed povis ĉeesti nur en la vendreda kunsido. Dum la kongresa semajno okazis pluraj subkomitataj kunsidoj, Jukka P. gvidis la subkomitaton pri informado.

La Komitato decidis i.a. pri jarraportoj de la jaro 2007 kaj faris planojn por la sekvaj jaroj. Ĝi elektis novan Elektan Komisionon (Renato



Corsetti, Lucy Harmon kaj Ileana Schroeder), kiu preparos la elektojn de nova estraro en sekva elekta jaro 2010. Subkomitataj raportoj estis pri-traktitaj de la komitato vendrede kaj fine ĝi akceptis la kongresan rezolucion.

La kongresa kuriero Jubileanto aperis 6-foje kaj raportis pri la komitatkunsidoj kaj pri ĉiuj aliaj eventoj dum la kongreso. En la retpaĝoj de UEA troviĝas ĉiuj informoj pri la komitataj decidoj kaj kongresaj eventoj. Ankaŭ la kongresa kuriero estas legebla tie.

Dum la solena fermo estis informita la decido de la UEA-estraro, ke la Universala Kongreso en 2010 okazos en Kubo. En la jaro 2009 la naskiĝurbo de Zamenhof Bjalistoko en Pollando bonvenigas la kongresanojn.

*Tiina Oittinen*

## Blinduloj kongresis en Kroatio

La Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazis meze de julio en Kroatio en Premantura. Premantura estas pitoreska vilaĝo, kiu situas sur la plej suda parto de la Istria duoninsulo, dek kilometrojn de Pula, ĉefurbo de Istrio. Kongreson aranĝis la Kroata unuiĝo de nevidantaj Esperantistoj (KUNE) sub aŭspicanto de Ministerio pri protekto de medio, spacplanado kaj konstruado. La Kroatia porblindula rekapabla centro allogis 76 partoprenantojn el 14 landoj, el Finnlando du.

La ĉefa temo de kongreso estis Nevidantoj en medio – Vivo en grandaj urboj. Enkondukan prelegon prezentis s-ro Lino Fuĉiĉ, reprezentanto de Ministerio-aŭspicanto. Ni aŭdis, ke la unua leĝo de la jaro 1982 tuŝis nur aliron de rulseĝoj. La EŬ-regularo gvidas postulojn. Nuna leĝo ekde 2003 provas trovi balancon inter kondiĉoj por diversaj handikapuloj, temas pri elementoj de partopreno: aliro, moviĝo, restado, dume bezonataj estas helpiloj kiel sonoriloj, palptuŝiloj, palpmesaĝiloj por averti linion, kampniveleojn ktp.

S-ino Mira Kataleniĉ parolis pri graveco de movebleco por plibonigo de vivkvalito de blinduloj. Antun Kovaĉ, prezidanto de kongreso rakontis pri siaj ĉiutagaj iradoj en zagreba medio

kaj Nedeljka Loĵajiĉ, prezidanto de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj pri avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la vivo de blindulo en granda urbo, dume Beogrado. Attila Varro, redaktoro de Esperanta Ligilo enkondukis diskutadon pri temo, kiel reprezenti blindulajn interesojn en la nuna, vidocentra socio. Diskuto pri memstara moviĝo rezultis alvoki decidfarantojn de komunumoj, ŝtatoj kaj institucioj de Eŭropa Unio en siaj decidoj konsideri aliron de vid-difektitoj al edukado, profesia trejnado kaj enlaborigo, kaj tiamaniere preventi diskriminacion.

LIBE estas membro de Eŭropa Blindul-Unuiĝo (EBU), kaj en la kultura kaj eduka komisiono reprezentanto de LIBE gvidas laborgrupon pri havigo de lernomaterialoj kaj teknikaj helpiloj. Pri la strukturo kaj agado de EBU parolis Arvo Karvinen. Fine li konstatis, ke en EBU-kongresoj reprezentantoj de gejunuloj parolas ekz. pri studado, hobiaj kaj enlaborigo. Li instigas gejunulojn skribi al la membroj de junulara prepara grupo de EBU kaj rakonti pri Esperanto-hobio, kaj efektiviĝi internacian renkontiĝon surbaze de Esperanto. ”Informado pri nia internacia lingvo, kaj amikaj rilatoj kun blindulorganizoj estas necesaj. Tiamaniere ni trovos aliron

al tiuj, kiuj deziras internaciajn kontaktojn, sed ne havas kuraĝon kontaktiĝi. Nur malgranda kvanto de gejunuloj havas kontentigajn taskojn en la okupoj de internaciaj organizoj. La ĉiujaraj Esperantokongresoj kreas konkretan eblecon sperti interkulturajn rilatojn kaj internaciecon pere de nia komuna lingvo.”

*Arvo Karvinen pretas puŝi globon faligi keglojn. Malantaŭa fumo signifas, ke nia lunĉo estas preparata.*



La kongresa rezolucio alvokas Esperanto-unuiĝojn de viddifektitoj kune kun naciaj blindulorganizoj subteni pere de Esperanto la dumjardekoj kreitan kulturon.

### Gejunuloj en kongreso

El Serbio kongreson partoprenis grupo de gejunuloj, kaj junaj kroataj helpantoj kreis ĉarman kaj instigan atmosferon. Tena Kuzmanoviĉ, 15-jara lernantino prizorgis apartan programon por gejunuloj kaj eĉ asistis en la preparoj de la internacia vespero. Ŝpomenka Ŝtimeĉ kaptis la okazon kaj lerte aranĝis por gejunuloj eblecon intervjui eksterlandajn partoprenantojn.

### Instruado, kulturo, diversaj aktivecoj kompletigis kongresan programon

Kutimajn ĉiumatenajn instrulecinojn gvidis Natalia Kasymova, kiu kun ludoj kaj kantoj inspiris nin kuraĝe paroli kaj eviti falsajn esprimojn. La nacia kaj internacia artaj vesperoj tradicie estas altnivelaj kaj ŝatataj eroj de kongresa programo. En la literatura vespero Ŝpomenka Ŝtimeĉ prezentis ŝian literaturan verkadon en Esperanto.

Ekskursoj konatiĝis nin kun vidindaĵoj de Istria regiono. Tuttaga ekskurso veturigis nin i.a. al la urbeto Hum kiu estas la plej malgranda urbo en la mondo. Apude, sur la Aleo de glagolicoj ni piediris kelkajn kilometrojn kaj palpis sur ŝtonojn hakitan malnovslavan alfabeton, glagolicon. Ekskurso kulminis en blindulripozejo Cukriĉi, kie okazis ŝakmatĉo kaj al ni nekonata, sed en Kroatio inter viddifektitoj ege ŝatata kegloludo per pendanta globo. Ŝakmatĉon kun ekipo el Unuiĝo de blinduloj en Istrio venkis la esperanta teamo. Venkintoj de ludoj eĉ ricevis medalojn kaj pokalojn.

Ĉifoje nia kongresa semajno ofertis ankaŭ eblecon al libertempaj aktivecoj, inter ili frumatenan kaj vesperan banadon en la maro, sur ŝtona plaĝo konstruata por blinduloj. Eblis ankaŭ provi pikadon (Darts) per parolanta tabulo. Iuj ŝatis promeni en la vilaĝa arbaro kaj pluki



*Pier Luigi da Costa kun juna akompanantino Tena konatiĝas kun malnovslava teksto.*

spicojn – laŭron, salvion, menton, rosmarenon, timianon ktp. – kiel bongustajn memoraĵojn de suna sudo.

### Iomete pri Premantura

Pitoreska, tre malnova, ĉemara vilaĝo Premantura enhavas 800 loĝantojn, sed somere loĝantaro kreskas per miloj da diverslandaj turistoj, kiuj plenigas gastejojn kaj apudajn aŭtokampadejojn. Marbordo de ŝtonaj plaĝoj iras 30 km orienten kaj okcidenten de vilaĝo, kiu kuŝas sur altaĵo ne pli ol 50 metrojn. Kverkarbaroj kaj pinoj ĉirkaŭas la vilaĝon.

Premantura havas mirinde eventoplenan historion. La arkeologiaj trovaĵoj apud Premantura pruvas, ke jam en la antikva tempo ĉi tie loĝis homoj, konataj al helenaj kleruloj. Post plurcentjara romia regado Premantura spertis regajn periodojn de deko da diversnaciaj administracioj – Bizanca potenco, Venezia, Napoleona ktp. Ekde 1991 Premantura vivas en la libera kaj sendependa Respubliko Kroatio.

Antaŭe la ĉefaj okupiĝoj de Premanturanoj estis terkulturado, brutbredado kaj fiŝkaptado, sed nun turismo. Pluraj laboras en Pula en ŝipfarejo Uljanik kaj en aliaj fabrikoj.

*Ritva Sabelli*

## Raportoj el Japanio 11

*HORI, Jasuo,*

*Raportoj el Japanio 11, 178 p.*

*Libroteko Tokio, 2008*

*ISBN 978-4-947728-31-9*

Ne elĉerpeblaj estas temoj kaj intereso pri Japanio. Jam la 11an fojon aperis raportaro de sro HORI, estrarano de UEA, pri Japanio. Sur la kovrilo videblas akvarelo pri du strigoj, fare de lia 90-jara patrino, kiel omaĝo al ŝi kaj kuraĝigilo al ni ĉiuj, kiuj nedepende de nia aĝo lernas kaj praktikas Esperanton.

La 23 raportoj de la libro traktas i. a. japanajn politikon, edukadon, tertremojn, nukleajn centrojn, sezonajn festojn. Ĉiu leganto certe trovos ion interesan por si, ĉu pri litvarmigaj potoj “jutanpo”, ĉu pri bluokulaj usonaj pupoj (kiuj fariĝis grava politikaĵo dum milito), pri la sorto de maljunuloj, pri morto de dorlothundo, pri malnovaj orepurigiloj. En la libro troveblas ankaŭ statistikoj, historieto kaj mapo pri Japanio, kiel en ĉiu “Raportoj” ĝis nun.

La aŭtoro konstatas, ke la mondo estas plektita el feliĉo kaj malfeliĉo. Li uzas sian plumon

por igi la mondon pli feliĉa malkaŝante falsaĵojn, manipuladojn kaj nejustecon, defendante pacon. En la 11a raportaro li kuraĝas malkaŝi siajn personajn opiniojn pli malferme ol antaŭe. Unu raporto estas de militkuracisto NAKAMURA Fumio (n. 1920), kiu kontraŭstaras militismon kaj priskribas siatempan politikan manipuladojn de la junularo kaj la tuta popolo. Ambaŭ aŭtoroj instigas al honesteco kaj paco.

La lingvo de la libro estas klara, tradicia Esperanto. Eraroj apenaŭ troveblas. Kelkajn fremdlandajn legantojn povus iom tedi aktualaĵoj pri japanaj politikistoj, se ilin ne interesas japana politikumado de la jaro 2007. Aliajn ĝuste tio povus interesi, ĉar eksterjapana gazetararo ne ĉiam rakontis pri tio aŭ menciis tion nur mallonge. Per la raportaro oni povas konatiĝi kun nuntempa vivo en Japanio kaj kun ties radiokoj en la fora pasinto. Elekteblas seriozaj, amuzaj, surprizaj legaĵoj, en iu ajn ordo. Kvardeko da nigrablankaj fotoj kaj desegnaĵoj malpezigas la paĝaron kaj helpas la leganton pli bone kompreni, pri kio la verkisto skribas.

*Saliko*

## Saluton el Arbaro de Zamenhof

Dum printempo 2008 pli ol 230 lernejoj vizitadis la Arbaron de Zamenhof en Taivalkoski, iom konatiĝis kun Esperanto kaj ties idealoj, vidis grandajn piceojn dediĉitajn al preskaŭ 20 landoj, aŭdis pri la Internacia Fabelkonkurso kaj lernis Evortojn pendigitajn ĉe statuetoj, arbotrunkoj kaj aliaj objektoj. Same faris somere la piedirantoj sekvantaj la padon nomatan laŭ la patrino de verkisto Päätaalo. Tio pruvas, ke la Aganto de la jaro 2001 daŭre agadas!

En la foto ŝi – sinjorino Aini Vääräniemi – kun sia filino Pauliina kaj duonsovaĝa erinaco.

*Saliko*



## Belartaj rezultoj

En ĉi-jaraj belartaj konkursoj de UEA en branĉo de poezio partoprenis 21 aŭtoroj, el kiuj Mikaelo Gishpling el Israelo gajnis la unuan premion pro "Rekviemo". Dua premio iris en Nederlando kaj tria en Luksemburgio. En prozo partoprenis 24 aŭtoroj, el kiuj Lena Karpunina el Rusio kaj Sten Johansson el Svedio gajnis la premiojn. En eseoj partoprenis nur 5 aŭtoroj kaj en teatraĵoj 6. La unuaj premioj en tiuj branĉoj restis ne aljuĝitaj, sed la duajn gajnis Luiza Carol en Israelo kaj Geraldo Mattos el Brazilo. En la branĉo de filmoj partoprenis neniu valida konkursaĵo.

En konkurso pri "Infanlibro de la Jaro 2007" partoprenis du libroj, el kiuj la ĵurio premiis "Breno kaj Bruno", originale verkita en Esperanto de Paulo Sergio Viana. En la Oratora Konkurso de la UK en Roterdamo partoprenis kvin gejunuloj el kvin landoj. La unuan premion gajnis Daniel Moreno Martinez el Meksiko pro parolado pri la temo "Ĉu oni devas kontraŭbatali la malaperon de lingvoj?"

(el komunikoj de UEA kompilis mm)

## Eventokalendaro de EAF

### 2008

23.-24.8.2008 FEJO-tendaro en Yyteri, Pori  
6.-19.9.2008 Koncerta turneo de Fransŭaz  
20.-21.9.2008 Aŭtunaj Tagoj en Heinola  
8.11. Esperantoklubo de Salo festas siajn 30 jarojn.

### 2009

Marto 2009 Vintraj Tagoj  
22.-26.6.2009 Esperantokurso en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi kun posta ekskurso al Valamo de Ladogo  
25.7.-1.8.2009 Universala Kongreso de Esperanto, Bjalistoko, Pollando

### Laborkunsidoj


30.8.2008 Estraro

## Du retejoj diplomitaj

La Estraro de UEA rajtas rekoni eksterordinare meritplenan agadon por la Internacia Lingvo per Diploma pri Elstara Agado. La Diploma estis starigita pasintjare. En 2008 ricevis ĝin du interretaj projektoj: *lernu.net* kaj *edukado.net*.

<a href="#">Sivu</a>	<a href="#">Johdanto</a>	<a href="#">Kursseja</a>	<a href="#">Opiskelu</a>	<a href="#">Viestintä</a>	<a href="#">Kirjasto</a>	<a href="#">Apuvivuja</a>	<a href="#">lernu!sta</a>
----------------------	--------------------------	--------------------------	--------------------------	---------------------------	--------------------------	---------------------------	---------------------------

**Tervetuloa lernu!-sivustolle**



*lernu!* on monikielinen sivusto, jonka tarkoitus verkossa liikkujia saamaan tietoa esperantosta kieltä maksuttomasti ja helposti.

Esperanto on elävä kieli, joka soveltuu erittäin kansainväliseen viestintään.

*lernu.net* estas plurlingva paĝaro, kiu estis lanĉita en 2002 kaj celas helpi al ret-uzantoj informi kaj lerni Esperanton senpage kaj en facila maniero. Verŝajne ne estas troigo diri, ke nuntempe ĝi estas la plej granda lernejo de Esperanto en la mondo. Ĝi estas vizitata averaĝe 75.000 fojojn monate. Ĉirkaŭ 7000 lernantoj jam kompletigis la unuan parton de ĝia baza kurso kaj 1500 lernantoj finis ĝian lastan, okan parton.

	Membroj entute: 1657	Serĉu laŭ ŝlosilvorto
	Gastoj: 3	<input type="text"/>
	Ensalutintoj: 0	Serĉu laŭ temoj
	ENSALUTU	<input type="text"/>
Aktualaĵoj	Hejmpaĝo >> Por lerni	
<b>Por lerni</b>	<b>Bonvenon ĉe la paĝaro de edukado.net</b>	
PINĈILUMADO dum UK Memore al Claude PIRON		

*edukado.net* estas retejo por instruistoj, prizorgata de Katalin Kováts. Ĝi celas subteni kunlaboron inter instruistoj, sed ĝi estas ankaŭ helpilo por memlernantoj. Ĝi estis lanĉita en 2001 kaj renovigita en 2005. En la retejo troviĝas i.a. katalogo de lerniloj, "lerniloteko" por interŝanĝi ekzercojn kaj testojn, legejo de lernosubtenaj materialoj, koresponda servo, ktp. La teamo de *edukado.net* liveris nemalhaveblan helpon por realigi la Esperantan version de la Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvo-ekzamenoj kaj de kelkaj jaroj prizorgas paroligajn lecionojn en UK-oj.

(el komuniko de UEA prenis mm)

## Aŭtunaj Tagoj en Heinola 20.-21.9.2008

Venu ĝui kaj amuzi en bela Heinola

## Syyspäivät Heinolassa 20.-21.9.2008

Tule viihtymään esperanton merkeissä  
kauniiseen Heinolaan

*Hotelli Kumpeli, Muonamiehenkatu 3, Heinola*

Dum la Aŭtunaj Tagoj en Heinola ni konatiĝos kun historio kaj nuntempo de la urbo kaj vidos lokajn vidindaĵojn piede kaj buse. Sabate ni promenos al la urbocentro kaj vizitos du muzeojn de Heinola: Urban muzeon de la 19a jarcento kaj domon de poliestro Aschan el 18a jc. En ambaŭ nin gvidos muzeaj ĉiĉeronoj (enirpago 7 e). Dumvoje al la muzeoj ni vidos la oktaedran preĝejon konstruita en 1807-11. Post la vizitoj ni promenos reen laŭ la Kymi-fluo al la hotelo, kie estos ripozpaŭzo antaŭ la vespera koncerto.

Dum la dimanĉa rondveturo ni vidos kun loka ĉiĉerono ankaŭ la ĉirkaŭaĵojn de la urbo. La rondveturo finiĝas ĉe la famaj birdejoj, kies eksteraĵoj estas malfermaj por vizito senpage.

Aliaj programeroj, aranĝataj en la kunvenejoj de la hotelo Kumpeli, enhavas sabatvespere agrablan kaj amuzan koncerton Fransŭaz de la muzikgrupo Duoble Unu. Ŝi gvidos nin *Tra la mondo*. Pri koncerta turneo de Fransŭaz legu en aparta artikoleto.

Dimanĉe ni aŭdos nian prezidanton, kiu prelegos al ni pri *Finnlanda kulturo en Esperantujo – kio videblas?*

Kontaktuloj pri AT-aferoj estas EAF-funkciuloj Päivi Saarinen kaj Tiina Oittinen, kontaktinformoj por ambaŭ sur paĝo 2. Vizitu la ttt-ejon de Heinola en la adreso [www.heinola.fi](http://www.heinola.fi) por konatiĝi kun la urbo kaj ĝiaj servoj. Aliĝu tuj (se vi ne jam aliĝis)! Bonvenon!

*Muzea domo  
de poliestro  
Aschan.*

*Lääninkivalteri  
Aschanin talo-  
museo.*

*(Foto: Päivi  
Saarinen)*



Tämänvuotisilla syyspäivillä tutustumme monipuolisesti Heinolan kaupunkiin ja näemme hie-  
man ympäristöäkin. Heinolan nähtävyyksistä  
käymme kaupunginmuseossa ja lääninkivalteri  
(poliisikonstaapeli) Aschanin talossa, näemme  
1807-1811 rakennetun kahdeksankulmaisen kir-  
kon ja vierailemme lintutarhoissa. Sunnuntaina  
on vuorossa kiertoajelu kaupungin ympäristöön  
paikallisoppaan johdolla.

Hotelli Kumpelin kokoustiloissa järjestetään  
päivien avajaiset, konsertti ja luennot. Lauan-  
tai-iltana on luvassa hauska, viihdyttävä ja kan-  
sainvälinen esperantokonsertti: toinen ranska-  
laisen yhtyeen Duoble Unun taiteilijoista, Fran-  
çoise Rochette, tulee jälleen Suomeen. Konsertti  
vie meidät matkalle maailman ympäri. Taiteili-  
jamme konserttikiertueesta voit lukea toisaalla  
tässä lehdessä.

Sunnuntain aamupäivänä puheenjohtajamme  
Tuomo Grundström pitää esitelmän aiheesta  
*Suomen kulttuuri esperantoksi – mitä näkyy?*

Ilmoittaudu syyspäiville ilmoittautumis-  
lomakkeen tietojen mukaan. Lisätietoja päivi-  
en järjestelyistä antavat liiton varapuheenjoht-  
taja Päivi Saarinen ja sihteeri Tiina Oittinen.  
Molempien yhteystiedot ovat lehden sivulla 2.  
Heinolan kotisivuilla [www.heinola.fi](http://www.heinola.fi) voi jo etu-  
käteän tutustua kaupunkiin. Tervetuloa!

## Programo / Ohjelma

(ŝanĝoj eblas, muutokset mahdollisia)

### Sabato / Lauantai, 20.9.2008

11.30-12.30 Konatiĝa prezento de Esperanto.  
Esperanton esittelytilaisuus.

11.30 Malfermo de akceptejoj. Vastaanotto  
avataan.

13.00 Bonvenigaj vortoj kaj malfermo de la  
tagoj. Tervetulosanat ja päivien avaus.

13.15 Aferoj kaj memoroj pri Heinola.  
Informoj de EAF. Tietoja ja muisteluja  
Heinolasta. Suomen Esperantoliiton  
tiedotuksia.

14.00 Kafo. Kahvi

## ALIĜILO

Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF 20.-21.9.  
2008 en Heinola.

Nomo \_\_\_\_\_

Adreso \_\_\_\_\_

Tel./Fakso/Ret-adreso \_\_\_\_\_

### Aliĝkotizo:

18 e ĝis 5.9.2008 \_\_\_\_\_

21 e poste \_\_\_\_\_

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub  
15 jaroj sen aliĝkotizo. Personoj loĝantaj ekster  
Finnlando laŭ interkonsento.

### AT-paketo 20.-21.9.2008

122 e

inkl. tranoktadon (2-lita ĉambro) en hotelo  
Kumpeli, manĝojn (kafo kaj vespermanĝo  
sabate, tagmanĝo dimanĉe) kaj rondveturon  
dimanĉe. \_\_\_\_\_

Entute pagenda al la konto de EAF \_\_\_\_\_

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.  
Bv. uzi la VT-referencnumeron **4640**.

Pliaj informoj aŭ deziroj \_\_\_\_\_

Bonvolu sendi la aliĝilon al:  
Esperanto-Asocio de Finnlando  
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki  
Retaj aliĝoj tra [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi)  
**BONVENON!**



## ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton syyspäiville 20.-21.9.2008 Heinolassa

Nimi \_\_\_\_\_

Osoite \_\_\_\_\_

Puh./fax/sähköposti \_\_\_\_\_

### Ilmoittautumismaksu:

**18 e** 5.9.2008 saakka \_\_\_\_\_

**21 e** 5.9.2008 jälkeen \_\_\_\_\_

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

**AT-paketti 20.-21.9.2008** **122 e**  
sis. yöpymisen 2-hh hotelli Kumpelissa, ruokailut (kahvi ja illallinen lauant., lounas sunn.) ja kiertoajelun sunnuntaina. \_\_\_\_\_

**Maksut yhteensä** Suomen Esperantoliiton tilille \_\_\_\_\_

Tilinumero: Sampo 800017-230825.  
Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja maksun yhteydessä).

Lisätietoja ja/tai toivomuksia

Lähetä lomake osoitteella:  
Suomen Esperantoliitto  
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki  
tai tiedot sähköpostitse:  
[eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi)  
**TERVETULOA!**

14.30 Vizito al du muzeoj de Heinola: Urba muzeo kaj domo de poliestro Aschan. Eniro-pago kun ĉiĉeronado 7 e/persono (pago surloke). Opastetut käynnit kaupunginmuseossa ja lääninkivalteri Aschanin talossa (maksu 7 e/hlö paikan päällä).

18.00 Vespermanĝo. Illallinen.

19.00 Vespera programo: Koncerto de Fransüaz: Tra la mondo. Françoise Rochette'n konsertti: Maailman ympäri.

21.00 Libera kunestado en hotelo. Vapaata yhdessäoloa hotellilla.

### Dimanĉo / Sunnuntai, 21.9.2008

9.00 Matenpreĝo de KELF. / Aamuhartaus, järj. KELF.

10.00 Tuomo Grundström: Finnlanda kulturo en Esperantujo – kio videblas? (Suomen kulttuuri esperantoksi – mitä näkyy?)

12.00 Lunĉo. Lounas.

13.00 Rondveturo en Heinola, gvidos finnlingve loka ĉiĉerono (traduko laŭbezono). Heinolan kiertoajelu, oppaana paikallinen matkailuopas.

15.00 Alveno al birdejoj kaj fermo de la tagoj. Saapuminen lintutarhoille ja päivien päätös. Memstara konatiĝo kun la birdejoj (libera eniro). Omatoiminen tutustuminen lintutarhoihin (vapaa pääsy).

## Someraj esperantogastoj en Jyväskylä

Atilio Orellana Rojas, Tiina Oittinen kaj Kerstin Kristofferson vizitis Jyväskylä dum sia revenvojaĝo el la ĉijara Valamo-kurso. En la urba biblioteko estis aranĝita interesa prelego de Atilio kun titolo Argentinano en Eŭropo. Tiina interpretis kaj la prelegon sekvis vigla diskuto pri multflankaj antaŭjuĝoj inter diversaj popoloj.

Hispana instruisto Javier Alonso, kiu loĝas en Francio, kuris maratonon en Rovaniemi en julio

## Koncerta turneo de Fransŭaz Rochette

Nia artistino el Francio alvenos al Helsinki vespere la 5an de septembro. Ŝi tranoktos en la oficejo en Siltasaarekatu. FEJO kun EKH provas aranĝi etan koncerton dum semajnfino aŭ lunde-marde.

Marde Fransŭaz vojaĝos al Turku, kie okazos koncerto merkrede la 10an de septembro. La koncerton aranĝas EST kunlabore kun loka muzikinstituto kaj krom Fransŭaz ludos ankaŭ la orkestro *Turun Musiikinystävain orkesteri* kaj kanzonkantistino Arja Lyly el Turku.

Vendrede 12an estos en programo vizito kun Tuomo Grundström en lernejo de Laitila kaj semajnfine kaj lunde-marde Fransŭaz koncertos en Raŭmo kaj eble vizitos ankaŭ en Pori.

En Tampere okazos koncerto la 18an de septembro en la muziksalono de la malnova biblioteko, aranĝanto estas Antaŭen.

# TRA LA MONDO



DUOBLE UNU

Post Tampere sekvos Aŭtunaj Tagoj en Heinola.

El Heinola Fransŭaz veturos al Vesanto por volontule labori en la salikrikoltado ĉe bieno de Kimmo Hakala. Kompreneble ankaŭ tie okazos muzikado, eble eĉ malgrandaj koncertoj, ekzemple en Iisalmi. La 6an de oktobro estos tempo por Fransŭaz reveni hejmen tra Helsinki.

Kontaktuloj pri koncertaj aranĝoj en Finnlando: Helsinki Patrik Austin, Jukka Pietiläinen. Turku: Tiina Oittinen. Rauma, Laitila, Pori: Tuomo Grundström. Tampere: Anja Karkiainen. Vesanto:

Kimmo Hakala. Iisalmi: Onni Kauppinen. AT en Heinola: EAF/Päivi Saarinen & Tiina Oittinen. Informiĝu ĉe ili.

Venu vojaĝi Tra la Mondo kun Fransŭaz!

*deziras EAF-estraro*

### *Javier Alonso kun sia maratonmedalo.*

kaj dum sia vojaĝo en Finnlando li renkontis lokajn esperantistojn i.a. en Helsinki, Tampere, Oulu, Jyväskylä kaj Lahti. La maratono bone sukcesis. Kiel memoraĵon pri la kurado li kunportis la medalon kaj la gazeton Lapin Kansa, kie lia nomo estis skribita inter la aliaj kurantoj. En Jyväskylä li speciale interesiĝis pri la arkitekturo de Alvar Aalto. Antaŭ sia hejmenvojaĝo li faris etan viziton al Sankt Peterburgo kaj renkontis ankaŭ tie esperantistojn.

*Seija Kettunen*




## Printempa ekskurso en Lempäälä

Sabatmatene 24.5. kolektiĝis 24 naturamikoj kaj unu hundo por migri etan parton de la longa Birgitan polku – padaro ĉe la lago Höytämönjärvi. La suno brilis, la ĉielo bluis kaj la migrantoj estis bonhumoraj kaj aventuremaj. Bone sukcesis la marŝado, kvankam la pado tie kaj ĉi tie estis kovrita per ŝtonoj kaj arboradikoj. Printempaj floroj jam beligis arbaron kaj ni studis kaj admiris jam konatajn kaj tute novajn kreskaĵojn. Tre mirigis nin ekz. la kvanto de arbaraj tilioj ĉe la vojo. Kompreneble la programo enhavis ripozigan manĝopaŭzon kun vigla babilado ĉe la lago.

Koran dankon al ĉiuj partoprenantoj kaj speciale al Lauri Liukkonen pro sia antaŭlaboro kaj gvidado dum la ekskurso. Venontjare ni eble renkontiĝos en la naturparko de Isojärvi en Kuhmoinen.

*Seija Kettunen*



*Du unuafojaj migrantoj Matti Hakala el Nakkila kaj Keke Uber el Jyväskylä (Aŭstralio) interkonatiĝas ĉe la fajro.*



*Studado de kreskaĵoj en arbaro.*

## Multflankaj artikoloj pri esperanto

En Länsi-Suomi -gazeto (21.4.2008) oni rakontis pri kunsido de Nörtamo-Seura, kie Tuomo Grundström parolis pri esperanto. Länsi-Suomi aperas en Rauma. Esperanto-kurso en Valamo estis temo de Heinäveden Lehti (2.7.2008), ĉar monaĥejo de Valamo situas en Heinävesi. En Satakunnan työ -gazeto (5.6.2008), kiu aperas en Pori, prezentiĝis Teuvo Alavillamo kaj lia laboro pri interretovortaro de esperanto.

Tuomo Grundström parolis pri esperanto en tradicia Kaffeholani en Rauma, historio de lingvo kaj tradukado de dialekto de Rauma en esperanton. Redaktisto skribis, ke la lingvo estas la plej parolata artefarita lingvo en la tuta mondo. Zamenhof deziris krei facilan kaj neŭtralan lingvon por uzi en internacia kunlaboro.

En bildo de Länsi-Suomi publiko de Kaffeholani, tridekkvar homoj, kantis marŝon de Brankkori en esperanto.

### Vortaro en interreto

En gazeto "Satakunnan työ" intervjuiĝis Teuvo Alavillamo pri esperanto kaj sia laboro pro vortaro de esperanto. Li lernis esperanton, kiam li estis 15 jaroj. Tiam Teuvo trovis Taitokirja de Vilho Setälä kaj vortaron de esperanto kaj lernis tion.

Dum multaj jaroj li ne uzis la lingvon, sed proksimume post kvin jaroj li revenis uzi ĝin. Tiam Teuvo tradukis mallongan tekston por TEJO per tradukomaŝino. Post tio oni dankis lin kaj petis, ĉu Teuvo Alavillamo volus traduki lernu-paĝojn en interreto en finnan lingvon.

"Tio estas pli granda laboro, sed kun tio la tempo fluas."

La gazeto skribas, ke se oni vizitas lernu-interreto-paĝojn, oni komprenas la grandan laboron de Teuvo. Dum kelkaj lastaj jaroj li faras kun aliaj homoj interretovortaron esperanto-finna-esperanto. Teuvo devas pripensi precize sencojn

de vortoj, kiam li faras vortaron. Li ankaŭ adaptas ĝin en rusa lingvo, germana lingvo ktp.

Esperanto estas ne afero de malgranda rondo. Esperantistoj volas, ke la lingvo disvastiĝas vaste kaj iĝos la dua lingvo al ĉiuj. Teuvo pensas, ke se esperanto estus dominema lingvo en la tuta mondo, ĉiu lando povus fari televido-programojn ktp. en propra lingvo kaj en internacia disvastigo de programo oni povus uzi esperanton.

"Feliĉe interreto ekzistas! Tio alportas liberecon al esperantistoj", diras Teuvo Alavillamo. Tie estas ĉio, kion oni bezonas.

En du fotoj de la artikolo Teuvo sidis hejme, kaj en la alia foto oni vidas ankaŭ lian komputilon.

### La naŭa somerkurso en Valamo

Heinäveden Lehti skribas pri esperanto-kurso en la Popola instituto de Valamo. Tion oni aranĝis la naŭan fojon en Heinävesi. Partoprenantoj estis 23 el multaj landoj. Instruistoj estis tri, Atilio Orellana Rojas el Nederlando, Tiina Oittinen kaj Patrik Austin el Finnlando. En grupo de komencantoj Ritva Jukkola el Vaasa, Maria kaj Mathias Runeberg el Helsinko kaj Liisa Lehtonen kaj Inkeri Grönqvist el sudokcidenta Finnlando diris, ke "estas ĉarme, kiam oni ne devas lerni esceptojn de gramatiko".

Atilio instruas esperanton kaj enspezas sian porvivon per tio. Tiina kaj Patrik havas aliajn profesiojn. Homoj lernas esperanton en interreto kaj en aliaj manieroj. La lingvo disvastiĝas almenaŭ en 120 landoj kaj Pasporta Servo, la internacia kutimo por loĝi kun aliaj esperantistoj, estas bona afero.

En la teksto de Heinäveden Lehti redaktisto rakontis kelkajn trajtojn de gramatiko de esperanto. En la foto de la artikolo Atilio Orellana Rojas kaj Tiina Oittinen estas en leciono kun siaj lernantoj.

*Jukka Noponen*

## Valama kursosemajno

Estas kelkaj kialoj, laŭ kiuj mi volis viziti Novan Valamon en Finnlando.

Unue, ĉi tiujn E-kursojn oni organizas fine de junio, antaŭ 93-a UK. Multe da homoj, kaj mi ankaŭ, bezonas altigi E-nivelon. Niaj geinstruistoj Tiina Oittinen, Patrik Austin kaj Atilio Orellana Rojas helpis al ni atingi la celon lude, parole kaj ride kun ni. Ni rakontis pri ĉio, eĉ ĉiu skribis malgrandajn historietojn pri sporto (juneco de niaj instruistoj ne permesis al ili forlasi sportajn temojn). Laŭ mia opinio, la historietoj rezultigis interesaj kaj diversaj. Tre aktuala estis temo pri gestoj, kiun proponis Atilio. Kiajn diversajn signifojn enmetas diversaj popoloj en la samaj signoj. Oni necese estu atenta kaj pacienca por vera kompreno! Bone, ke ni havas ne nur gestojn, sed ankaŭ esperanton!

Due, ortodoksa monaĥejo en Nova Valamo estas heredanto de ortodoksa monaĥejo sur la insulo Valaam en lago Ladoga en Rusio. Nur ĉi tia kialo estus sufiĉa por mia vizito en Nova Valamo en Finnlando. Ni, rusoj, devas danki finnojn pro ilia laboro por konservado, lernado, uzado kaj evoluo de ortodoksa kaj rusa kulturo. Kiel agrable estis aŭdi rusan kantadon en preĝejo kaj vidi rusvestitajn homojn (viroj – en strabkolumaj ĉemizoj, virinoj – en sarafanoj)! Mi jam vizitis ortodoksan monaĥejon sur la insulo Valaam en lago Ladoga, sed multe da jaroj antaŭe. Mi vidis grandajn preĝejojn kaj aliajn konstruaĵojn, kamparojn, arbarojn, ĝardenojn

*Maisa el Kotka, Katja el Sankt-Peterburgo, Kerstin el Svedio.*

kaj rezultojn de homaj laboroj. Mi volus denove ekvidi Valaaman monaĥejon sur la ladoga insulo kaj certiĝu, ke ĝi renaskiĝas.

Kaj fine, la tria kialo por viziti Novan Valamon estas bela kaj pura naturo (denove dankon al finnoj!). Oni ne povas eviti siajn okulojn vidi la brilan surfacon de laga akvo, la grandajn antikvajn ŝtonojn! Sed la plej mirinda mi konsideras la florantaj bonodorantaj herbejoj! Mi fotis kaj grandajn arbojn, kaj malgrandajn floretojn, kvazaŭ volante elporti ilin kun mi.

Estas malfacile rakonti pri ĉio aŭ ĉiuj. Pri multe da temoj mi skribis nenion (pri ekskursoj, ŝipkrozado, saŭno, teatraĵo, komuna kantado ktp). Mi ĝojas, ke mi vizitis Valamon kaj ekkonis tre interesajn homojn: Lydia el Estonio, Kerstin el Svedio, Eeva kaj Jukka, Osmo, Raimo, Sirkka, Maisa kaj aliaj el Finnlando!

Dankon! Ĝis nova renkontiĝo!

*Amike, Katja – rusa esperantistino el Sankt-Peterburgo.*







*Jukka Laaksonen  
rakontas pri la monaĥejo.*



*Herbejoj de Valamo  
en foto de Jukka  
Nikoskelainen.*



*Esperantisto el Brazilo salutis nin per fotoj el tiea kongreso.  
Maldekstre: transdono de flago. Dekstre: Tarcisio kaj gekantistoj.*

## Esperanto kiel cerbogimnastiko

Lastasomere kuracisto konstatis, ke mi havas renomalsanon kiu devigas min je dializo tri fojojn en semajno. Alidire, mi devas kuŝi en hospitalo dum tri tagoj en semajno, kvin horojn pofoje konektita al maŝino. Ĉi tiun malsanon oni ne povas kuraci. Nova reno estas sola rimedo, sed ne estas facile trovi konvenan renon, kaj la operacio povas esti tre danĝera.

Por mi la plej malfacila afero en dializo estas enuiĝado. Mi estas intruisto en fremdaj lingvoj, pro kio studi lingvojn estas la plej natura rimedo por mi repuŝi enuiĝadon. Mi ekstudis Esperanton, ĉar gramatiko estas unu el miaj plej karaj intereso (!) kaj la konsekvenco de Esperanta gramatiko ĉarmas min tre multe. Ĉi tio ne estas unua fojo kiam mi konatiĝas kun Esperanto. Antaŭ longe mi ekhavis svedan lernolibron en Esperanto, sed mi tiam ne havis tempon por stu-

dado kaj mi baldaŭ forgesis ĉion kion mi lernis. Nun mi havas tempon. Mi ekhavis aliajn lernolibrojn kaj vortaron, aliĝis al Esperanto-Asocio de Finnlando kaj komencis legi Esperantajn tradukojn. Ĉar mi estas lekciisto de tradukado en la Universitato de Helsinki (nun pensionata) kaj oficiala tradukisto, unu el miaj rimedoj studi Esperanton estas provi traduki finnlingvajn tekstojn al Esperanto, ekzemple partojn de Seitsemän veljestä, kaj kompari miajn tradukojn kun la traduko Sep fratoj. Mi rekomendas!

Esperanto estas grava rimedo por mi resti fiksita en anso de la vivo. Lastatempaj esploroj montras, ke cerbogimnastiko kreas novajn kontaktojn inter ĉeloj en la cerbo de maljunaj homoj ankaŭ, kio estas bona medikamento kontraŭ demenco.

*Seppo Mussalo (74)*

---

## Pasporta Servo 2008: elektronika anstataŭ papera ekzemplero

*Multaj gastigantoj de Pasporta Servo en diversaj landoj dum la printempo kaj somero miris, kie prokrastiĝas la adreslibro de tiu ĉi jaro – dum iuj tamen ricevis ĝin. En julio la redaktisto Derk Ederveen fine konkludis la situacion jene:*

Pardonon pro la longa prokrasto de tiu ĉi informo. Montriĝas ke multaj gastigantoj tamen ne ricevis sian 'senpagan' paperan ekzempleron de Pasporta Servo.

Laŭ mia peto la presejo detale esploris kaj informiĝis, kaj certigas ke ĉiuj adreslibroj por gastigantoj estas dissenditaj. La problemo ŝajne do okazis ie survoje, inter la poŝtoficejo en Pollando kaj la adresoj de gastigantoj.

Dum UK mi diskutis la situacion kun la prezidanto de TEJO, Gregor Hinker. Nun jam estas tro malfrue por represi kaj resendigi adreslibrojn.

Krome, TEJO tute ne povus pagi tion. Tial ni decidis helpi al gastigantoj per elektronika ekzemplero, kiun ili povas uzi dum la resto de la jaro.

Bonvolu sendi al mi mesaĝon se vi ne ricevis vian paperan ekzempleron, kaj ŝatus ricevi elektronikan ekzempleron anstataŭe. Vi ricevos ligon al la PDF-dosieroj.

Kvankam nek mi, nek TEJO, respondecas pri fuŝoj de la polaj kaj/aŭ tutmondaj poŝtaj servoj, ni ĉiuj sincere bedaŭras ke ĉi-jare vi ne ricevis paperan ekzempleron. Kune kun TEJO kaj la presejo ni provos zorgi ke venonta eldono atingos vin.

*Derk Ederveen*

(el ttt-ejo de TEJO prenis mm, kiu ankaŭ ne ricevis la paperan)



# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti [ilkka.santtila@welho.com](mailto:ilkka.santtila@welho.com).**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. [www.esperanto.fi/helsinki](http://www.esperanto.fi/helsinki) [jukka.p@esperanto.fi](mailto:jukka.p@esperanto.fi) (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. [☎ 0500 813 530](tel:0500813530) [onni.kauppinen@pp.inet.fi](mailto:onni.kauppinen@pp.inet.fi)
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. [☎ 040 867 2743](tel:0408672743) [www.esperanto.fi/jyvaskyla](http://www.esperanto.fi/jyvaskyla)
- ♦ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. [martti.pennanen@phnet.fi](mailto:martti.pennanen@phnet.fi)
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry, (Olli Pajula) Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. <http://esperantooulu.info/> [olli.pajula@baanamail.fi](mailto:olli.pajula@baanamail.fi)
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla [matti.wallius@ebaana.net](mailto:matti.wallius@ebaana.net)
- ♦ Esperantoseura Antaūen ry. / Esperantosocieto Antaūen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. [☎ 050 5245 823](tel:0505245823) [tapani.aarne@mbnet.fi](mailto:tapani.aarne@mbnet.fi))
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi)
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärsvägen 89, 25700 Kimito. [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi). Tilinro: 445023-283606
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. [\(09\) 660 651](tel:09660651)
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: 563000-2213606

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 12 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Hämeenlinnan esperantistien yhteystiedot: Verda Kastelo / Markku Sarastamo, Linnan kasarmi. Kenraalin talo. 13100 Hämeenlinna. [sarastamo@gmail.com](mailto:sarastamo@gmail.com)

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla ja Taivalkoskella.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2008**  
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
5	10.9.	15.9.	5.10.
6	10.11.	15.11.	5.12.

### Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: [eaflehti@esperanto.fi](mailto:eaflehti@esperanto.fi) aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



---

## Rezolucio de la 93-a UK

La 93-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Roterdamo de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2008 kun 1845 partoprenantoj el 73 landoj por diskuti la kongresan temon “Lingvoj: trezoro de la homaro”,

Festante ĉi-jare la centjariĝon de Universala Esperanto-Asocio,

Notante la gravan rolon de lingvoj en la konservado de scioj kaj kulturoj, kaj en la ebligado de malsamaj aliroj al la mondo,

Rimarkante la daŭran diskriminacion kontraŭ lingvoj je ĉiuj niveloj kaj aparte kontraŭ la lingvoj de indiĝenaj popoloj kaj malplimulto, kaj

Atentigante pri la valoro de la facile lernebla kaj neŭtrala lingvo Esperanto, kiu estas mem lingva trezoro de la homaro, kaj pri la pli ol cent-jara sperto de ĝia praktika utilo kiel ligilo inter kulturoj,

Varme bonvenigas la decidon de Unuiĝintaj Nacioj, ke la jaro 2008 estu Internacia Jaro de Lingvoj, kaj alte taksas la iniciatojn de Unesko

en tiu kampo menciitajn en la mesaĝo de ties Ĝenerala Direktoro al la Kongreso,

Reemfazas la neceson doni egalan respekton al ĉiu lingvo, al ĉiu kulturo kaj al ĉiu homo en la mondo,

Alvokas la Esperanto-komunumon disvastigi Esperanton kaj ĝiajn valorojn de respekto al ĉiu homo kaj de egaleco inter ĉiuj homgrupoj, kaj per tio kontraŭbatali la malaperon de lingvoj kaj kulturoj tra la mondo,

Invitas al kunlaboro kun ĉiuj organizaĵoj kaj instancoj kiuj laboras por konservi lingvojn kaj kulturojn kaj defendi lingvajn homajn rajtojn,

Instigas ĉiujn agnoski la esencan valoron de lingva diverseco, lige kun la kreskanta agnosko pri biologia diverseco, kaj

Proponas al la monda komunumo science esplori la rolon de Esperanto en pli efika kaj justa komunikado tra la mondo.

*(el komunikado de UEA)*

### Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy lokakuussa. Jutut 15.9.2008 mennessä EAF:n toimistoon. La venonta numero aperos en oktobro. Artikoloj ĝis 15.9.2008 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.

**Cityoffset, Tampere 2008**